

Intervjuo kun Marinko Givoje (2): Esperanto en bibliotekoj
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 706, 1977.04.20 & 22 & 23

Cl.- Parolas sinjoro Claude Gacond. Pasintan semajnon ni havis la okazon aŭdigi al vi intervjuon, kion ni faris kun Sinjoro Marinko Givoje el Zagrebo. Sinjoro Givoje venis en Svislandon por serĉadi pri vortaroj en CDELI, Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale. Li raportis pri siaj impresoj pri la scienca laboro, kiu efektiviĝas en la urbo La Chaux-de-Fonds. Hodiaŭ ni refoje babilas kun Sinjoro Marinko Givoje. Sinjoro Givoje ne la unuan fojon vi venis en Svislandon, ĉu ne ?

MG.- Jam mi estis kelkfoje, sed unu la plej memorinda estas unu el la Universalaj Kongresoj, kiu okazis en Bern.

Cl.- ...en 1947, se mi ne eraras ?

MG.- Jes. Tiam, mi, traveturante Svislandon haltis kelkfoje kaj restis ĉe miaj korespondantoj, amikoj. Unu foje kun edzino mi estis en Davos, kiel pulm-malsanulo, sed ŝajnas al mi ke tio tamen ne estas la plej grava afero. En nuna momento ŝajnas al mi korespondado kun kelkaj gravaj personecoj monde konataj pli grava, ĉar tio konserviĝis en formo de leteroj kaj tiuj personoj estas unuavice : Edmond Privat, la plej nobla homo kiun mi renkontis en la vivo. Li estis ankaŭ dum la kongreso en Zagreb en 1953, kiam mi, kiel estro de gazetara servo, intervjuis lin kaj li faris festparoladon. Sed antaŭ tio mi kinis lin laŭ elsendoj, kiujn li gvidis.

Cl.- Estas interese ! Ĉu vi povas doni viajn impresojn kaj kiam tio okazis ?

MG.- Mi estis tiam novulo, kiu ankaŭ eraris. Malbone uzis la artikolon 'la'. Diris 'bona vespero' anstataŭ 'bonan vesperon' kaj la sola solvo estis aŭskulti elsendojn kaj tiam Berno pli frue ol nia Zagrebo, ni komencis nur en 1953-a. Kaj vi pli frue. Kaj Edmond Privat ĉiam regule parolis. Estis serio da prelegoj pri Svislando, kiuj poste aperis en libro-formo. Sed tiujn elsendojn mi regule ne nur aŭskultis, se gravis noti mi havis libreton, kio ankaŭ nun konserviĝis, kie mi notis koncizan enhavon de la prelegoj. Tiam elsendoj komenciĝis per jenaj vortoj de Edmond Privat : 'Aŭdu Svislandon!' – li havis tiel belan akcenton, kvankam li ne estas slavo (oni diras, ke ni slavo, ni diru, plej klare parolas), sed lia dirmaniero, lia elparolo estis tute klara kaj tio tuj kaptis min por la movado. Kaj sincere dirite, ne el gazetoj, kiujn mi legis, sed el elsendoj de Radio Bern mi multon lernis. Kaj dua personeco estas Hans Jacob.

Cl.- Jes, la estinta sekretario de UEA, kiu laboris en Ĝenevo, ĉu ne ?

MG.- Jes. Unue li, same kiel Edmond Privat, estis grandaj amikoj de Jugoslavio. Due, li, same kiel Edmond Privat havis kontakton siatempe kun niaj politikaj gravuloj. Ankaŭ Hans Jacob kiel socialisto, se mi ne eraras, havis favoran sintenon al tiutempaj strebadoj de Jugoslavio. Mi kiorespondis kun li precipe pri preparado de enciklopedio de Esperanto, ĝi devis aperi kiel eldonaĵo de Stafeto, sed estis grandega laboro, poste Hans Jacob disdiris malagrablaĵojn, maljuste, pri kiuj mi ne volas paroli, kaj mi multe korespondis kun li. Leteroj ankoraŭ konserviĝis. Estis ankaŭ bona homo, kiu sian tutan vivon, oni povas diri, oferis por la movado.

Cl.- Sinjoro Givoje, vi nuntempe serĉas vortarojn. Kiacele ?

MG.- Celo estas jena. Ne-esperantista eldonisto pretas presigi manuskripton pri vortaroj de planlingvoj. Kaj CED instigis siajn kunlaborantojn redakti manuskripton, kolekti vortarojn – kaj jen ni tion faras kaj ni starigis al ni limdaton - kongreso en Rejkjavik - ĝis kiam ni devas pretigi manuskripton.

Cl.- Kaj ĉefe do pri la ne-esperantaj vortaroj vi laboras, ĉu ne ?

MG.- Jes, ĉefe pri ne-esperantaj en la nuna momento.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Claude Gacond intervjuis Sinjoron Marinko Givoje el Zagrebo. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*